- Tiuj proponoj ĝenerale supozigas unualoke pli altan nivelon de harmoniigo, do pli da centraligo kaj malpli da libereco por la unuopaj membroŝtatoj. Ili estas reflektado de programa centralismo kaj naiva kredo al memsaviĝo de unuecaj centraj solvoj. La konsekvencoj de centraligo de azila kaj migra politiko estas ja gravaj. Ju pli granda estas unuigo sur la nivelo de la EU, des pli malgranda estas la spaco por la membroŝtatoj decidi pri tio, kiel ili formas kondiĉojn de sia malfermeco al la akceptado de alvenantaj azilpetantoj aŭ klasikaj almigrintoj. Temas pri rajto de ĉiu ŝtato determini, kiun ĝi lasas vivi ene, sub kiaj kondiĉoj, kiel alte ĝi fiksas plafonon. Nature, ke tiaj politikaj decidoj havas fundamentajn sociajn, ekonomiajn, sed ankaŭ sekurecajn konsekvencojn.

- Multaj proponoj havas fortan komponanton de „solidareco“ en la unia koncepto, kiu signifas „solvado“ de problemoj (kaj ofte konsekvencoj de erara politiko sur nivelo de la EU) per ilia distribuo inter ĉiuj membroŝtatoj. Tio ne inkludas nur la translokigon de azilpetantoj, sed ankaŭ kelkajn aliajn rimedojn, kiuj kaŝe kondukas samdirekten.

- En la preparo de multaj proponoj videblas granda hasteco kaj neorganiziteco. Proponoj de novaj leĝoj estas ofte prezentataj en momento, kiam la ĝisnuna regularo nek havis tempon stabiliĝi kaj nek ekzistas sufiĉaj spertoj kun ĝia aplikado. El tio rezultas, ke la Komisiono ne povas obstine provi tranĉi pluan peceton de la salamo de la aŭtonomio de membroŝtatoj, kiam la kriza situacio ofertas taŭgan okazon al tio. Eble ĝi ankaŭ volas ŝajnigi, ke ĝi konservas iniciativecon kaj ke ĝi aktive solvas la krizon.

- Neniuj proponoj celas direkte al la haltigo de la kontraŭleĝaj migrantoj antaŭ la limoj. Maksimume ili devus nerekte helpi al pli facila integriĝo kaj malkovro de

ilegalaj transpaŝintoj kaj ilia revenigo. Iuj eĉ strebas disvastigi vojojn de legala emigrado argumentante, ke tio devus malaltigi la motivadon al la kontraŭleĝa enmigrado.

- Ni koncedu, ke iuj unuopaj proponoj aŭ iuj iliaj elementoj estas laŭraciaj. Tamen negativaj trajtoj en formo de plua centraligo, hasteco kaj falsa solidareco ege superpezas kaj konfirmas la ĝeneralan impreson.

Alarmanta estas la idea pozicio de la uniaj organoj aŭ politikaj kaj intelektaj elitoj al la nuna situacio. Kontraste al tio, kion atendus de siaj estroj la granda plimulto de civitanoj – tio estas fari ĉion por la haltigo aŭ restriktado de la migra ondo – la konsideroj de la unia establiĝo iras aliloken. Unualoke staras kompleziĝemo kaj delikateco rilate al la migrantoj, strebo prezenti ilin ekskluzive en pozitivaj koloroj, emfaziĝo de avantaĝoj de enmigrado kaj kondamno kaj riproĉoj rilate al kontraŭuloj de tiu ĉi pozicio. Plue ni vidas firman decidemon savi Ŝengenton je kia ajn kosto, kiu estas prilaudata pli ekzalte ol iam antaŭe kaj laŭdiraj riskoj ligitaj kun ĝia disigado estas prezentataj en apokalipsa maniero. La tria rimarkebla – kaj oni povus diri memkomprenebla – orientado konsistas en streboj maksimume ekspluati la novan „beatan krizon“ al plua hardigo de centralismo; kiel kutime ni aŭdas sub la devizo „pli da Eŭropo“ vokado al centraj solvoj kaj plifortigo de la uniaj strukturoj. Konsiĉo de la neceso malebligi amasajn premojn de la kontraŭleĝa enmigrado grandparte ĉeestas, tamen en la konsideroj pri rimedoj en tiu direkto oni observas grandan singardemon, nerektecon kaj preskaŭ hontemon.

Ni vidas nun kiel multe la ideologio de *ĉiam pli mallarĝa Unio* estas ligita kun progresista nova maldekstremo kaj kiel en la kazo de la migra krizo fariĝas sinergio de tiuj ambaŭ direktoj. Vidpunkte de la centralismo la situacio ofertas bonvenan okazon por la plifortigo de la Unio – por la ekspansio de la uniaj leĝoj kaj atingado de pli alta nivelo de harmoniigo, larĝigo de kompetencoj de la uniaj agentejoj, pligrandiĝo de la nombro de dungitoj kaj budĝeto ktp. – sed ankaŭ por diluado de la naciaj komunumoj kiel ĝisnunaj bremsoj de progreso en la procezo de la kreado de eŭropa ŝtato kaj por estiĝo de nacie neankrigitaj „novaj eŭropanoj“. La moderna maldekstremo siaflanke perceptas migrantojn el fremda kultura ĉirkaŭaĵo kiel unu el la tipaj eroj de nova „proletario“, t. e. protektataj minoritatoj, kiujn necesas ĉiurimede favori, kaj sur kiuj ĝi mem apogas sin kiel sur sia bazo en la societo kaj dum siaj streboj pri la formigo de „nova homo“.

La pozicio al la migra krizo montras, ke la doktrino de *ĉiam pli mallarĝa Unio* kun sia kuntuŝa unuigo kun moderna maldekstra progresismo malgraŭ sia senĉesa krio-pledado por „pli da Eŭropo“ reprezentas danĝeran detruivan ideologion, kiu minacas Eŭropon kiel civiliza rondo. Malsukcesigas kaj malkuraĝigas ĝian defendokapablon kontraŭ la danĝero el la ekstero, al kiuj ĝi male servas kaj kapitulacias. En ĝi kun siaj sociaj eksperimentoj (sur ondoj de ideologio *gender*, kulto de seksaj minoritatoj, kontraŭdiskriminacio, politika korekteco) kreiĝas vojo al kontraŭutopia societo, kiu jam ne estos io, kio valorus la defendon kontraŭ la ekstera mondo.

Ĉu Esperanto apartenas al la lingvoj nomataj „Dua lingvo“ laŭ la dokumento COM (2008) 566 final?

Viktor Dvořák

Resumo

Tiu ĉi traktato informas pri la multlingveco en la Eŭropa Unio kaj pri tio, kiel en la Ĉeĥa Respubliko estis akirita agnosko, ke Esperanto apartenas al la dua grupo de lingvoj laŭ la dokumento COM (2008) 566, fina – Bruselo 18. 9. 2008.

Proksimume antaŭ tricent sepdek jaroj Johano Amoso Komenio en sia traktato “Via lucis” publikigis ideon pri interkompreniĝo de civitanoj en Eŭropo. Li unue proponis, sugestis, ke „lingvoj de fakuloj“ estu uzataj, kaj due, krei artefaritan lingvon por civitanoj, tiel nomatan „Universala lingvo“, kiu estu pli facile lernebla kompare al la lingvoj uzataj en Eŭropo. Ni volas demonstri, kiel sukcese la problemo de interkompreniĝo estis ĉiujare solvata en EU ekde 2008, kaj kion oni rekomendas en la sciigo “Komuniko de la Komisiono al la Eŭropa Parlamento, la Konsilio, la Ekonomia kaj Socia Komitato de la Regionoj – Multlingveco: riĉo por Eŭropo kaj komuna devontigo {SEC(2008)2443} {^xCOM/2008/0566 fina^x/“ {koncize: Sciigo}. Tie estas multvorte diritaj utiliaĵoj el la plenumado de la Barcelona celo: ebligi al la civitanoj komuniki per du lingvoj aldone al sia gepatra lingvo.

En la menciita Sciigo estis rekomendite, unue, kiuj lingvoj estas akcepteblaj por la plenumado de la Barcelona celo, kaj due, kion la registaroj de la unuopaj ŝtatoj de EU faru por la plenumado de la Barcelona celo.

En la Sciigo la lingvoj estis klasifikitaj en du grupoj: en la unua grupo estu unu lingvo elektita el la „tutmonde uzataj lingvoj“ kaj en la dua restantaj inklude tutmonde uzatajn lingvojn, kiujn oni ne elektis kiel la unuan. La registaroj de la unuopaj membroŝtatoj elektos, kiu lingvo estos la unua, kaj kiu la dua. En la Ĉeĥa Respubliko la angla lingvo estis elektita kiel la unua. Laŭ informo el la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj ne estas en ĉiuj ŝtatoj de EU la angla lingvo elektita kiel la unua. Por elekti la duan lingvon estis en la Sciigo referencitaj ekzemple lingvoj oficialaj en EU, lingvoj de unuopaj najbaraj ŝtatoj, najbaraj ŝtatoj de la nuntempa EU aŭ disvastigota EU, lingvoj de fakuloj, specialigitaj fakoj, lingvoj uzataj en komercaj kaj ekonomiaj entreprenoj, dulingvaj familioj ktp. Tiu ĉi ĝenerala elnombro montras vastan skalon de lingvoj akceptitaj por dialogo en EU. Estas evidente, ke ne ĉiuj eŭropanoj interkompreniĝos, nur anoj de la grupoj, kiuj uzas la saman intertraktan lingvon. Notinde estas, ke en la Sciigo ne estas menciita eĉ unu artefarita lingvo, por la interkompreniĝo de la civitanoj, tiel nomata Universala lingvo laŭ Johano A. Komenio.

Por ke ni eksciiu pri la lingva politiko en la Ĉeĥa Respubliko, rilate al eksterlandaj ŝtatoj, estis sendita letero al la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de ĈR kun la demando, ĉu estas eble aldoni, krom la supre cititaj ekzemploj de la “Dua lingvo“, ankaŭ lingvon uzatan en interkulturaj dialogoj, sociaj retoj, subtenantan interkompreniĝon, sed la nomo de la lingvo Esperanto ne estis menciita. Estis motivo, ke iuj pensas, ke per Esperanto oni ne povas almenaŭ interkomuniki, spite tiujn Esperanto estis akceptita kiel la 63-a lingvo en la reto

de Guglo. La respondo el la ministerio estis, ke eblas tiun lingvon aldoni kaj laŭ la intenco de la Ministerio de Instruado de ĈR (MIĈR) estis la listo de “Dua lingvo“ jam en ĈR rekomendita.

Persona konsultado en MIĈR koncerne, ĉu Esperanto apartenas al la grupo de lingvoj nomataj la “Dua lingvo“ kaj, ĉu oni povus instrui ĝin regule en la lernejo, ĉefe en la baza lernejo ne nur en tiel nomataj „eksterlernejaj intereso-rondoj“, ni ne ricevis negativan respondon. Nur estis al ni rekomendite skribi informpeton al MIĈR, ĝi estos prijuĝota de du fakuloj kaj laŭ la rezulto estos la afero decidita. La informpeto estis skribita kiel kritiko de la dokumento Sciigo kaj substrekis, ke Esperanto-asocioj plenumas la rekomendojn postulitajn de la Sciigo al la membroŝtatoj de EU. Sekve la Pedagogia komisiono de ĈEA ricevis retan mesaĝon, ke la lingvo Esperanto apartenas al la grupo de la „Dua lingvo“.

Ni volas aldoni: Ni estas konviktitaj, ke celo de Esperanto estis jak estas esti la „dua lingvo por ĉiuj“, laŭ Komenio nomata la Universala lingvo. Por parolantoj de ĉiuj lingvoj de la mondo, kaj principe ankaŭ por ĉiuj tavoloj de la popolo, ankaŭ por homoj, kiuj posedas malfortan talenton por lingvoj. Por tiuj homoj estas en la Sciigo rekomenditaj teknikaj rimedoj, sed ni demandas: „Ĉu traduk-aparato proksimigos homojn tiel intime kiel la persona kontakto?“

En la Ĉeĥa Respubliko estas ellaboritaj la unuopaj lingvo-skemoj por la instruistoj, kiel oni povu instrui la anglan, germanan, kaj francan lingvojn, por ke la lernantoj akiru, je la fino de la elementa lernejo, la lingvo-scipovon je la nivelo A1 kaj A2. Tio estis por s-ano Malovec modelo kiel skribi la saman lingvo-skemon por Esperanto adaptita al la lernolibro „Esperanto per rekta metodo“ de Stano Marček. Ni ne scias, ĉu la lingvo-skemo por la Esperanto estos utila al la Esperanto-asocioj en aliaj ŝtatoj, sed ni supozas ke jes, ĉar ĝi plenumos la postulon de EU akiri lingvoscion de la nivelo A1 kaj A2 en la bazaj lernejoj.

Konkludo:

Kiel estas dirite, laŭ la fina versio de la „Komuniko de la Komisiono COM(2008)0566, Bruselo, la 18-an de septembro 2008“, estas la registaroj de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio instigataj al la plenumado de la Barcelona celo: ebligi al la civitanoj komuniki per du lingvoj aldone al sia gepatra lingvo. La unua lingvo estos rekomendita al civitanoj de la registaro, la dua – elektita. Estas evidente, ke ne ĉiuj Eŭropanoj interkompreniĝos, ĉar ne ĉiuj volas aŭ kapablas lerni la duan, ne facilan „vivan“ lingvon. Solvo de ĉi tiu problemo de la dua lingvo estu la artefarita lingvo Esperanto, sed ĝi en la citita dokumento ne estas nomita. Estis montrite, ke eblis en ĈR akiri konfirmon por Esperanto kiel samvalora “Dua lingvo“. Por la estonteco estus utila, ke Esperantistaj asocioj de la restantaj ŝtatoj de EU faru la saman, por ke Esperanto estu de sube instalota en la dokumentojn de EU.

LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

Poemoj kaj rakontoj de Petr Ginz

Polusa

ludi videon de muzikigita poemo
Glaciaj montoj, foraj horizontoj,
frostitaĵoj kaj glaĉeraj kampoj
suno, ruĝa de glaciaj kolosoj,
mil rebriloj de scintilanta prujntavolo,
migraj birdoj celantaj suden.
Ili forlasas nin, konantaj multajn belojn,
citronajn boskojn kaj cipresajn ombrojn
en la sudo – ties pejzaĝo
havas alian, gajoplenan trajton.
Adiaŭ, vi kuraĝuloj.
Ili persistas sub la firmamento,
spiranta magion de foraj landoj,
glaciaj remparoj tra polusa nebulo
direkte al ruĝa suno surhorizonte
Ili iras ĉiam al la nordo.



Rememoro pri Prago

Kiel longe jam pasis la tempo,
kiam mi vidis la lastan tagon
subiri la sunon post Petřín-monto.
Larmanta rigardo kisis Pragon,
vualatan de la vespera ombro.
Kiel longe ne tuŝis mian aŭdon
ĉarma murmuro de kaskado Vultava?
Longe jam bruas Venceslaan placon
forĝesis mia kapo senrava.
La nekonataj anguloj de Prago
en ombro de buĉejoj kaj blindaj kloakoj,
kiel vi fartas? Ne trafos nin aflikta plago
reciproke - pasis jam multaj monatoj.
Preskaŭ unu jaron kaŭras mi en aĉa kavo
viajn belaĵojn nur kelkaj stratoj anstataŭas.
Kvazaŭ en kaĝo kaptita sovaĝa rato.
Prago, vi ŝtonfabelo, mi ĉiam rememoras!

La frenezeta Aŭgusto

En la aero estis humide kaj malvarme. En ĝi pendis ĉifonoj de ŝtale griza nebulo, kiuj preskaŭ tuŝis la supraĵon de la ondoj. Malagrabra vetero. La ondanta verda maso en distanco de ĉirkaŭ 100 jardoj perdis la konturojn, ĝis ĝi kunfandiĝis kun la nebulo. En kajuto de Bonifacia sidis Aŭgusto. Oni nomis lin frenezeta Aŭgusto, sed la juna ŝipknabo Petro fidis Aŭguston. „Li ne estas frenezulo,“ li kutimis diri, „li estas alia, iel stranga. Li verŝajne konas grandan sekreton, kiun vi ne komprenas, eĉ kompreni ne povas.“ - „Vi jam estas preskaŭ sama kiel li, vi komplete freneziĝos, se vi kun li daŭre babilos,“ diris al li la ceteraj ŝipknaboj. „Ili estas nekleraj,“ ĉiam diris Aŭgusto kaj liaj okuloj tiumomente ŝajnis al Petro, kvazaŭ ili estus rigardantaj lin de sur alta monto, vualita de nuboj. Ne, Aŭgusto ne estis frenezulo, certe ne, li sciis ja paroli tiom konvinke. Kaj Petro lin certagrade amis, tiun frenezulon kun profundaj okuloj, kaj kredis lin. Kaj tiu Aŭgusto parolis strange. „Tiamaniere parolas neniu en la mondo,“ pensis Petro, „dum mia vivo mi ne aŭdis, ke kapitano, piloto, ŝipknaboj aŭ havenanoj parolus tiel strange“. Komprenu, tiuj estis lia tuta mondo.

Estis nokto. Ĉio dormis, nur sur la ferdeko estis aŭdeblaj paŝoj de la hunda vaĉo. Petro estis ekdormanta. Liaj muskoloj ŝajnis al li molaj kaj senpezaj. Liaj muskoloj, lia tuta korpo ŝajnis al li liberaj kaj kun la libera korpo liberiĝis ankaŭ la spirito kaj lian menson vualis bluetaj nebuloj de dormo. Li estis perdanta la konscion. Subite kiel de elektra sparko li eksentis leĝeran tuŝon. Petro pene leviĝis sur sia marista lito, ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis la super si klinitan figuron de la freneza Aŭgusto. „Iru rapide,“ stimulis lin la voĉo de Aŭgusto. Petro sen protesto ellitiĝis, kvankam sub la kovrilo estis varme, dum ekstere malvarme. Li postsekvis lin eĉ ne pepante. Ili eniris la subŝipejon. Aŭgusto bruligis kandelon. Ĝia malforta lumo apenaŭ kapablis forpeli la tenebron, kiu embuskis post ĉiu elstaraĵo, en ĉiu niĉo. Ili atingis etan kameron en la subŝipejo. La frenezeta Aŭgusto eniris kaj Petro post li. La ŝlosilo knaris en la seruro kaj poste malaperis en la poŝo de Aŭgusto. Li starigis la kandelon sur la teron, sidiĝis sur keston kaj kovris la kapon per la manoj. Petro kaŭriĝis, ĉar estis malvarme. Aŭgusto levis la kapon. En la kandela lumo ekradiis lia elstara vizaĝo, en kiu kiel du miniaturaj fajretoj lumis la rebriloj de liaj okuloj. Pasis momento. Etaj muŝoj flirtis ĉirkaŭ la flamo. Aŭgusto aŭdiĝis. Lia voĉo efikis ĝene en la morta silento. „Vivo? Kio estas vivo? Kiel la kandelo lumo, per kiu la senprudentaj kuloj bruligas siajn flugilojn!“ Denove regis silento, rompita nur de tempo al tempo de kraketo de la meĉo. „Kompatindaj kuloj.“ – „Kial ili flugas ĉirkaŭ la lumo?“ – Paŭzo. Malrapide li parolis al si mem, kvazaŭ meditante: „Kutimo – movado cele al individua ekzistado kaj necerteco...“ Denove li metis la kapon en la manojn kaj tradentis: „Ili flugas fascinitaj ĉirkaŭ la flamo, ĝis ĝi bruligas ilin kaj ili falas detruitaj. Stultuloj!“ – „Stultuloj? La kutimo kaj necerteco estas tro fortaj, ili ne povas rezisti. Kompatindaj insektoj!...“ Ambaŭ sidis silente. Petro miris, kial li estas ĉi tie, anstataŭ trankvile dormi sur sia lito. „Ekcerbumu pri la vivo, knabo,“ rediris Aŭgusto „ĝi estas kiel tiu flamo. Ĉu vi vidas, ĉu vi komprenas? Pro kutimo ni flugas ĉirkaŭ ĝi devante morti. Ni aspiras al nia propra „Mi“ kaj por akiri tiun premion ni fordonas ĉion!“ Li etendis la manon

kaj estigis la kandelon. En la kamero ekregis mallumo. Estis aŭdeble, ke la kuloj forflugis, senigitaj de la fascina kandela flamo. Dum momento ili ankoraŭ zumis, sed poste ilia flugil-zumado ĉesiĝis. Verŝajne ili elflugis en liberan spacon tra iu fendo. „Ĉu vi vidis, *ĉu vi vidis*,“ aŭdiĝis el la tenebro la voĉo de Aŭgusto, „ĉu vi bone perceptis, knabo?“ ripetis Aŭgusto kaj forŝovis la kovrilon de la kesto kun pulvo.

„Ankoraŭ unufoje, Flamariono,“ oni aŭdis kvazaŭ de nemezurebla distanco voĉon de la kapitano, ludanta kartojn.

„Liberigo...“ flustris Aŭgusto. Li etendis la manon kaj ĵetis lumantan alumeton en la keston da pulvo.

Kaj la kamero ekflamis per giganta helo kaj en la fajro de la eksplodo Petro ekvidis la ekbrilon de la Granda Kunfandiĝo.

El la vivo de senviva aĵo

Plejparto el ni scias, ke senviva aĵo neniam kaj sub neniamaj cirkonstancoj povas ĝui la vivon. Nur tia aĵo, kiu vivas en daŭra kontakto kun homoj, ŝanĝiĝas kaj estas jam preskaŭ parto de ilia propra vivo, nur tian aĵon eblas nomi vivanta. Kaj unu el tiaj aĵoj estas sakro.

"Vi azeno kretena, vi kanajlo..." Mi ankoraŭ klare memoras, kiel post alveturo de la transporto Dq efikis sur min tiu ĉi unua serio de Volek. Mi sentis, kvazaŭ spirus sur min Prago per siaj lumigitaj avenuoj, la silentiĝinta riverbordo kaj la glimanta Vultavo. Kaj tiam mi malkovris, ke la sakroj havas sian sekreton. Same kiel popolaj kostumoj, kutimoj kaj artoj ili respegulas la medion de sia estiĝo. Ekzistas sakroj bonstilaj kaj trivialaj, civilizitaj, kaj preskaŭ mi dirus prehistoriaj. La civilizitajn ne necesas serĉi malproksime, ni renkontas ilin ĉiupaŝe: Idioto, kreteno, primitivulo!; kiel vi vidas, sakro ĉerpas el modernaj sciencaj malkovroj. Sed foje mi aŭdis nigrulon, kiu senpezigis sian koron per jena maniero: li larĝe malfermis la okulojn, disblovis la nazotruojn kaj el lia buŝo elpuŝiĝis gargaro: Bovo, vire kapsku! (Bovo vin voru!) La du ekzemplojn mi ne elektis hazarde. Rigardu la terezinajn sakrojn (ili ne estas elpensitaj, mi aŭdis ilin per propraj oreloj): Primitivulo merdanta! Kreteno velkinta! Rato materialisma, egoisma! Ni vidas du signojn: unu signo de civilizacio, la alia ne malsimila al la nigrula. Klarigo sin prezentas mem. Terezino estas urbo, kie la supraĵan civilizacion ĉiam pli forpuŝas instinkto de memkonservado, egoismo, pugnoraĵto kaj multaj aliaj motivoj, kiujn la ekstera mondo sukcesis plejparte forigi. Ekkoni la mondon laŭ sakroj, aŭdi sakrojn de kulioj en Ŝanhajo, Singaporo, fiŝistoj en Novlando, nobeletoj en Cejlono, geĵsoj en Japanio, perloĉasantoj en Bengala golfo - ĉiam estis mia idealo. Kaj foje, ekkoninte la mondon kaj ĝiajn loĝantojn laŭ sakroj, mi estis revenanta hejmen per vaporŝipo Pacific kaj la bruo de la ŝipa helico min lulas en dormon. Tiel, kontenta pri mi mem, mi ekdormas kaj en la subkonscio de mia kapo pulsas la helico de la Homera heksametro: Kaj dormis la tutan nokton, de dolĉa sonĝo katenita.

El la paĝaro <http://www.vedem-terezin.cz>

La Kristnaska legado

Kaj en tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto, ke la tuta mondo estu registrita. **2** Ĉi tiu estis la unua registrado, farita, kiam Kirenio estis reganto de Sirio. **3** Kaj ĉiuj iris, por esti registritaj, ĉiu al sia urbo. **4** Kaj Jozef ankaŭ supreniris el Galileo, el la urbo Nazaret, en Judujon, al la urbo de David, kiu estas nomata Bet-Leĥem, ĉar li estis el la domo kaj familio de David, **5** por esti registrita kun sia fianĉino Maria, kiu estis graveda. **6** Kaj dum ili estis tie, venis la tagoj por ŝia akuŝo. **7** Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar ne estis loko por ili en la gastejo.

8 Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis sian gregon. **9** Kaj anĝelo de la Eternulo alstaris apud ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili timis per granda timo. **10** Kaj la anĝelo diris al ili: Ne timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo; **11** ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro. **12** Kaj jen la signo por vi: vi trovos infaneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo. **13** Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante Dion, kaj dirante:

14 Gloro al Dio en la supera alto,
Kaj sur la tero paco, inter homoj Difavoro.

15 Kaj kiam la anĝeloj foriris de ili en la ĉielon, la paŝtistoj diris unu al alia: Ni jam iru ĝis Bet-Leĥem, kaj vidu ĉi tiun okazintaĵon, kiun la Eternulo sciigis al ni. **16** Kaj rapidante, ili iris, kaj trovis Marian kaj Jozefon, kaj la infaneton kuŝantan en la staltrogo. **17** Kaj tion vidinte, ili sciigis pri la diro, kiu estis parolita al ili pri ĉi tiu infano. **18** Kaj ĉiuj aŭdintoj miris pri tio, kion rakontis al ili la paŝtistoj. **19** Sed Maria konservis ĉiujn tiujn dirojn kaj pripensis ilin en sia koro. **20** Kaj la paŝtistoj revenis, glorante kaj laŭdante Dion pri ĉio, kion ili aŭdis kaj vidis, kiel estis parolite al ili.

21 Kaj kiam jam pasis ok tagoj por cirkumcidi lin, oni donis al li la nomon JESUO, kiel li estis nomita de la anĝelo, antaŭ ol li estis en la ventro. **22** Kaj kiam finiĝis la tagoj de ilia purigado laŭ la leĝo de Moseo, ili alportis lin al Jerusalemo, por prezenti lin al la Eternulo, **23** kiel estas skribite en la leĝo de la Eternulo: Ĉiu virseksulo, kiu malfermas la uteron, estu dediĉita al la Eternulo; **24** kaj por alporti oferon laŭ tio, kio estas dirita en la leĝo de la Eternulo: Paron da turtoj, aŭ du kolombidojn. **25** Kaj jen en Jerusalemo estis viro, kies nomo estis Simeon, kaj ĉi tiu estis justa kaj pia, atendanta la konsoladon de Izrael; kaj la Sankta Spirito estis kun li. **26** Kaj estis montrite al li de la Sankta Spirito, ke li ne mortos, ĝis li vidos la Kriston de la Eternulo. **27** Kaj li venis per la Spirito en la templon; kaj kiam la gepatroj enportis la infanon Jesuo, por fari pri li laŭ la kutimo de la leĝo, **28** tiam li ricevis lin en siajn brakojn, kaj benis Dion, dirante:

29 Nun, ho Eternulo, Vi ellasas Vian servanton,
Laŭ Via vorto, en paco,

30 Ĉar miaj okuloj vidis Vian savon,

31 Kiun Vi preparis antaŭ la vizaĝo de ĉiuj popoloj,

32 Lumon por malkaŝo al la gentoj,
Kaj gloron de Via popolo Izrael.

33 Kaj lia patro kaj lia patrino miris pri tio, kio estis parolita pri li; 34 kaj Simeon ilin benis, kaj diris al Maria, lia patrino: Jen ĉi tiu estas metita por la falo kaj leviĝo de multaj en Izrael, kaj por signo kontraŭparolata; 35 kaj ankaŭ vian animon glavo trapasos; por ke la pensoj de multaj koroj malkaŝiĝu. 36 Kaj estis unu profetino, Anna, filino de Fanuel, el la tribo de Aŝer (ŝi estis grandaĝa, loĝinte sep jarojn kun sia edzo de post sia virgeco, 37 kaj estinte vidvino okdek kvar jarojn), kiu neniam foriris el la templo, adorante per fastoj kaj preĝoj nokte kaj tage. 38 Kaj alveninte ĝuste en tiu horo, ŝi dankis Dion, kaj parolis pri li al ĉiuj, kiuj atendadis la elaĉeton de Jerusalem. 39 Kaj kiam ili jam faris ĉion, konforme al la leĝo de la Eternulo, ili revenis en Galileon, al sia urbo Nazaret.

40 Kaj la infano kreskadis kaj fortiĝis, pleniĝante de saĝeco; kaj la graco de Dio estis sur li.

41 Kaj liaj gepatroj iris ĉiujare al Jerusalem ĉe la Paska festo. 42 Kaj kiam li estis dekdujara, ili supreniris laŭ la kutimo de la festo; 43 kaj kiam ili jam pasigis la tagojn, ĉe ilia returniĝo la knabo Jesuo restis en Jerusalem, kaj liaj gepatroj tion ne sciis; 44 sed supozante, ke li estas en la karavano, ili iris tagan vojaĝon, kaj serĉis lin inter siaj parencoj kaj konatoj; 45 kaj ne trovinte lin, ili reiris al Jerusalem, serĉante lin. 46 Kaj post tri tagoj ili trovis lin en la templo, kie li sidis meze de la instruistoj, aŭskultante ilin kaj metante al ili demandojn; 47 kaj ĉiuj, kiuj aŭdis lin, miregis pro lia kompreno kaj liaj respondoj. 48 Kaj ili miris, vidante lin, kaj lia patrino diris al li: Filo, kial vi tiel agis kontraŭ ni? jen via patro kaj mi serĉis vin kun malĝojo. 49 Kaj li diris al ili: Kial vi serĉis min? ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro? 50 Kaj ili ne komprenis la diron, kiun li parolis al ili. 51 Kaj li malsupreniris kun ili, kaj venis en Nazareton, kaj li estis obeema al ili; kaj lia patrino konservis ĉiujn tiujn dirojn en sia koro.

52 Kaj Jesuo progresis en saĝeco kaj staturado, kaj en graco ĉe Dio kaj homoj.



El la Sankta Biblio, Sankta Luko, ĉapitro 2

LULU DE HONOLULU

Muziko: Ivan Mládek

Origina teksto: Ivan Mládek, Miloslav Procházka

Traduko: Tomáš Břicháček

Moderato

The musical score is written in treble clef with a common time signature. It consists of three staves of music. Above the first staff are guitar chords: C, Dm, and G7. Above the second staff are C, F, and Fm. Above the third staff are C, Am, Dm, G7, C, and (G7). The lyrics are written below the notes.

Ma - ro, flo-roj, bon - o - do - roj, su - no su - bi - ras, i - noj dan - cas,
van - goj bru - las kaj mi pri - pen - sas: Ki - on eb - le fa - ras
mi - a dol - ĉa Lu - lu de Ho - no - lu - lu ?

1. Maro, floroj, bonodoroj, suno subiras,
inoj dancas, vangoj brulas kaj mi pripensas:
Kion eble faras mia dolĉa Lulu
de Honolulu?

2. Vento siblas, ŝtormo bruas, lavango falas,
ŝafoj blekas, vaker' ploras kaj mi pripensas:
R. Kion ...

3. Granda amo, grand' feliĉo, fianĉin' belas,
Parencoj al mi gratulas kaj mi pripensas:
R. Kion ...

4. Tre signifa dura matĉo ni kaj Kanado,
homoj krias, streĉa dramo kaj mi pensas do:
R. Kion ...

5. Kanto finas, neniu Lulu fakte ekzistas,
Mi forigos fantaziojn, kiuj persistas.
R. Kion ...



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7